Rusia Esperantista Unio

Regiona agado

Raportoj por la 30-a Konferenco de REU

La enhavo

Raporto pri regiona agado de rusiaj esperantistoj dum la deĵora periodo aŭgusto 2017 — julio 2018.....2

Listo de regionaj aranĝoj laŭ regionoj.....5

Raportoj de regionaj kunordigantoj de REU pri la agadperiodo julio-2017 — julio-2019.....6

Tiĥvina distrikto,

17-a–18-a de julio 2019

Raporto pri regiona agado de rusiaj esperantistoj dum la deĵora periodo aŭgusto 2017 — julio 2018

Parto 1

Bazaj konceptoj de la respondeculo pri regiona agado (RA) *Irina Gonĉarova*

Celo de la laboro:

- riveli ekzistantajn esperantistojn kaj potencialajn aktivulojn en ĉiu arondismento de RF;
- inspiri la regionajn esperantistojn al E-agado kaj helpi al ili trovi konvenajn agadkampojn;
- helpi al regionaj esperantistoj realigi iliajn agadintencojn;
- starigi laborajn ligojn kaj eventuale kunagadojn de la regionoj inter si kaj kun REU.

Labordirektoj:

- kompili liston de la regionaj kunordigantoj;
- interkonsenti kun ĉiu kunordiganto pri ties taskoj (kiuj ne nepre koincidos)
- kolekti kaj regule aktualigi informojn pri la E-agado en la regionoj
- serĉi eblojn de la regiona E-evoluo kaj pridiskuti tiujn kun la regiona kunordiganto;
- helpi kompili la laborplanojn por stabiliga periodo (poste – por proksima kaj fora perspektivoj), sekvi plenumadon de tiuj planoj;
- stimuli interregionan kunlaboron kaj helpi pri ties planado;
- konsile kaj morale subteni la regionajn agantojn;
- informi REU-Estraron kaj rusiajn esperantistojn pri stato de la laboro.

*Laŭ evoluo de la agado povas aldoniĝi aliaj direktoj.

En aŭgusto-oktobro-2017 estis faritaj la sekvaj agadoj:

- ellaboritaj bazaj konceptoj de la laboro de la respondeculo pri regiona agado (RA) por la deĵora periodo (aŭgusto 2017 – julio 2019), inkludantaj listigon de laborceloj kaj labordirektoj de RA;
- kompilita provizora laborplano de respondeculo pri regiona agado por la prepara periodo 15.08.17 – 15.12.17, celanta al la fino de la 2017-a jaro (post interkonsento kun ĉiu regiona kunordiganto) kompilon de laborplano de RA por la jaro 2018;
- estis decidite ĝustigi regionojn de REU-agado en Rusio konforme al la aktualaj federaciaj distriktoj de RF kaj estis nomumitaj ok regionaj kunordigantoj de REU en ĉiuj ok federaciaj arondismentoj de RF;
- ĉiu regiona kunordiganto tuj post konsento akcepti la postenon ricevis kelkajn leterojn kun instrukcioj pri la unuaj agadpaŝoj;
- en VKontakte estis farita grupo por regionaj kunordigantoj REAGo.

La unua tasko de la regionaj kunordigantoj estis kompili adresaron de ekzistantaj esperantistoj de la regiono. La laboro disvolviĝis jene:

- Uralo: la listo jam ekzistis kaj esperantistoj aktive kaj regule interagadis dank'al aktivadoj de Raja Kudrjavceva kaj Pavel Veselov;
- Siberio: dank'al entuziasma laboro de Vladimir Sapoĵnikov, sin apoganta al Krasnojarska E-klubo, komenciĝis aktiva esplorado de la regiono, rezulte de kio estis aperintaj kaj reaperintaj novaj kaj malnovaj esperantistoj kaj iom post iom tra la jaro aperis E-grupoj, kunvenoj, kursoj kaj interagado;
- Nord-Okceento: Andrej Rjazancev proponis kaj diskutigis sian sistemon de adresar-kompilado;
- For-Oriento: Jevgenij Bojĉin informadis pri mizera kvanto da regionaj esperantistoj, sed ĉe ĉiu eblo daŭrigis sian individuan agadon pri popularigo de Esperanto, raportante pri ĝi.
- Centro, Nord-Kaŭkazio, Sudo, Volgio trasilentis.

Por helpi al la silentuloj ekhavi liston de regionaj esperantistoj al REU-estrarano Aleksandr Mitin estis direktita peto revizii la liston de REU-membroj, rezulte de kio estis farita grava laboro pri aktualigo de la listo. Sed tio neniel influis aktivadon de la regionaj kunordigantoj.

REU-respondeculo pri regiona agado iniciatis, fizike ĉeestis kaj gvidis kelkajn aktivulajn kunvenojn en la regionoj.

En oktobro 2017, antaŭ la 22-a ***Lingva Festivalo***, pasis kunveno de ĉeborsaraj esperantistoj, celanta revigligi Esperanto-vivon en la urbo. La malnovaj aktivuloj, nostalgiantaj pri sia glora Esperanto-pasinteco, produktis kelkajn interesajn ideojn por regulaj kunvenoj – sed pro manko de interesita organizanto pluen la afero ne moviĝis. Tamen mem Lingva Festivalo en Ĉeboksari restas spaco de fortega Esperanto-popularigo.

Decembre/januare-2019 dum ***Novojarsk-4 en Krasnojarsko*** (**Siberio**) okazis kelkaj aktivulaj kunvenoj, dum kiuj estis akceptitaj kaj poste realigitaj gravaj decidoj pri evoluo de la Siberia Esperanto-movado.

En majo-2019 dum la ***4-a Lingvotrejnado en Jekaterinburgo*** ni okazigis gravan fermitan aktivulan kunvenon, kiu helpis ricevi realisman bildon de la landa Movado kaj kompreni pri ĝia plia evoluo.

En novembro-decembro-2017 kaj januaro-februaro 2018 okazis du gravaj celkonformaj agadoj.

1/ Ĉiumonate estis eldonata nova interreta bulteno “MiA MASI”, detale prilumanta diversflankan agadon de Moskva Esperanto-Asocio “MASI” kun la celo liveri al regionoj ekzemplojn kaj metodojn de movada aktivado; ĉiu numero estis sendita persone al ĉiu regiona kunordiganto, estis libere kaj senpage atingebla rete kaj vaste reklamata. Ĝi aperadis ĝis junio 2018 kaj havis aprobon de multaj eksterlandaj esperantistoj, sed ĝi sukcesis elvoki neniom da intereso flanke de rusia esperantistaro.

2/ En februaro-2018 sub aŭspicio de UEA estis organizita en Apudmoskvo **AMO-Seminario (AMo-RU-1)** – aktivula maturigo kun la temo, aprobita de REU-Konferenco en Paŝeĥonjo (aŭgusto-2017), nome: “Junigo ***de Rusia Esperanto-Movado***”. Malgraŭ ke la aranĝo pasis sukcese, ĝi ne povis multe influi al evoluo de Esperanta Movado en Rusio pro objektivaj kialoj.

Tradiciigon de AMo-RU kiel apartan kelktagan seminarion forte malhelpas neeblo kolekti rusian aktivularon samtempe en unu loko – pro grandegaj distancoj, altaj vojaĝkostoj kaj diverstempaj ferioj. Por superruzi tiujn malfacilaĵojn estis formulita propono eksperimente konsideri kiel erojn de **AMoRU-2** primovadajn programerojn, okazantajn dum 2019 ene de diversaj landaj Esperanto-aranĝoj. Rezulte la programon de ***Amo-Ru-2*** konsistigis 5 programeroj de ***Novojarsko-4*** (**Siberio**), 2 de ***APERo-13*** (**Centro**), 2 de ***OrSEJT*** (**Siberio**) kaj 2 de la ***4-a Lingvotrejnado*** (**Uralo**). Bedaŭrinde, ne ĉiuj el ili havas protokolojn kun la decidoj, tial ne estas multe valoraj. Tamen la ideo meritas plian praktikadon kaj poluradon.

El la aferoj de 2018 indas mencii du tutlandajn projektojn, kiu ne estis iniciitaj de la REU-respondeculo pri regiona agado. Tiuj estas

1/ Tutlanda projekto de REU-prezidanto ***Svetlana Smetanina*** (**Centro**) pri ***turneo de franca esperantistino Fransuazo Oazo*** tra la lando, kiun partoprenis 13 urboj de Rusio el 5 regionoj. Tiu evento estas la plej tutlanda dum multaj jaroj de REU-funkciado kaj, malgraŭ multaj malkontentoj flanke de gastigantoj, ĝin eblas taksi kiel sukcesa eksperimento.

2/ Iniciato de ***Raja Kudrjavceva*** (**Uralo**) pri tutlanda celebrado de Lidoviko Zamenhof per deklamado de liaj poemoj en publikaj lokoj aŭ dum klubaj kunvenoj la 10-25-an de decembro 2018:

“***Decembra poezia marŝo de esperantistoj***”. Ankaŭ tiu projekto plene sukcesis (vd la raporton de Urala regiono).

Dum la raportita periodo en Rusio pasis 24 regionaj aranĝoj:

1/ Aŭgusto-2017. **Siberio**. Renkontiĝo de Amikoj-12, Novosibirsko (NEK)
2/ Oktobro 2017. **Uralo**. Tradicia aŭtuna renkontiĝo de uralaj esperantistoj, dediĉita al someraj Esperanto–aranĝoj. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”).
3/ Oktobro-2017. **Volgio**. 22-a Lingva Festivalo en Ĉeboksari (Lingva lernejo “Язык для успеха”).
4/ Novembro-2017. **Uralo**. Aŭtuna Lingvotrejnado en Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”).
5/ Novembro-2017 - marto-2018. **Uralo**. Tutregiona reta Esperanto-aktivaĵo “Fotoj el mia albumo”.
6/ Decembro-2017. **Centro**. 12-a Moskva Lingva Festivalo (MEA MASI).
7/ Decembro-2017. **Uralo**. Tradicia festa kunveno de uralaj esperantistoj, dediĉita al la Zamenhof–Tago kaj la Tago de la Esperanta Libro. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”).
8/ Decembro-2017-januaro-2018. **Siberio**. Novojarsk-3 en Tomsko (TEK).
9/ Februaro-2018. **Centro**. APERo-12 en Apudmoskvo (MEA MASI).
10/ Marto – aprilo de 2018. **Uralo**. Tutregiona reta Esperanto-aktivaĵo “Transdonu bonhumoron”.
11/ Majo-2018. **Centro**. Skriba KER-ekzameno en Moskvo (KER-teamo).
12/ Junio-2018. **Uralo**. Somera Esperanta kunveno de uralanoj kun kultura programo kaj komuna koncerto. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”).
13/ 25 oktobro –10 decembro-2018. **Uralo**. Tutregiona reta Esperanto-aktivaĵo “Libroj, kiujn ni legas”.
14/ Julio-2018. **Siberio**. Renkontiĝo de Amikoj-13, Novosibirsko (NEK).
15/ Aŭgusto-2018. **Centro**. RET-2018 en Ŝuja (REU).
16/ Oktobro-2018. **Volgio**. 23-a Lingva Festivalo en Ĉeboksari (Lingva lernejo “Язык для успеха”)
17/ Decembro-2018. **Centro**. 13-a Moskva Lingva Festivalo (MEA MASI)
18/ Decembro-2018. **Uralo**. Tradicia festa kunveno de uralaj esperantistoj, dediĉita al la Zamenhof–Tago kaj la Tago de la Esperanta libro. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”).
19/ Decembro-2018-januaro-2019. **Siberio**. Novojarsk-4 en Krasnojarsko (KRESKO).
20/ Marto-2019. **Centro**. APERo-13 en Apudmoskvo (MEA MASI).
21/ Aprilo-2019. **Centro**. Parola KER-ekzameno en Moskvo (KER-teamo).
22/ Majo-2019. **Uralo**. Printempa Lingvotrejnado en Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”).
23/ Majo-2019. **Siberio**. OrSEJT en Tomsko, dediĉita al 40-jariĝo de TEK (TEK)
24/ Julio-2019. **Nordo**. Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj-5 (Tiĥvona Esperanto-Klubo)
Vidu ankaŭ apartan liston de la samaj aranĝoj, ordigitan laŭ la regioonoj.

Konkludoj

Post AMo-RU-1, al la printempo-2018, iĝis klare, ke laboro de REU-respondeculo pri la regiona agado preskaŭ neniom influas al la aktiveco de la regionoj: la dormantaj daŭre dormas, la agantaj agas same, kiel ili agis sen REU-instrukcioj. El memstaraj agantoj menciindas Uralo, inter kies multaj aktivadoj elstaras ***la 3-a kaj 4-a Lingvotrejnadoj***, allogantaj ankaŭ eksteruralajn esperantistojn. Ties ĉeforganizanto ***Raja Kudrjavceva*** estis nomumita Esperantisto de la Jaro 2017. La sola ekzemplo de REU-influo al regiona agado estas **Siberio**, kie reaktiviĝis ***Vladimir Sapoĵnikov***, sukcesinta aktivigi sian regionon. Pro tio li estis nomumita de REU Esperantisto de la jaro 2018.

Irina Gonĉarova,
la estrara respondeculo de REU pri regiona agado
12.07.2019

Listo de regionaj aranĝoj laŭ regionoj

Dum la raportita periodo en Rusio pasis 24 regionaj aranĝoj:

1. **Centra Regiono**:

1-1/ Decembro-2017. 12-a Moskva Lingva Festivalo (MEA MASI)

2-2/ Februaro-2018. APERo-12 en Apudmoskvo (MEA MASI)

3-3/ Majo-2018. Skriba KER-ekzameno en Moskvo (KER-teamo)

4-4/ Aŭgusto-2018. RET-2018 en Ŝuja (REU)

5-5/ Decembro-2018. 13-a Moskva Lingva Festivalo (MEA MASI)

6-6/ Marto-2019. APERo-13 en Apudmoskvo (MEA MASI)

7-**7**/ Aprilo-2019. Parola KER-ekzameno en Moskvo (KER-teamo)

2. **For-Orienta Regiono** — ne okazis

3. **Nord-Kaŭkazia Regiono** — ne okazis

4. **Nord-Okcidenta Regiono**:

8-**1**/ Julio-2019. Tiĥvinaj Esperanto-Metiejoj-5 (Tiĥvona Esperanto-Klubo)

5. **Siberia Regiono**:

9-1/ Aŭgusto-2017. Renkontiĝo de Amikoj-12, Novosibirsko (NEK)

10-2/ Decembro-2017-januaro-2018. Novojarsk-3 en Tomsko (TEK)

11-3/ Julio-2018. Renkontiĝo de Amikoj-13, Novosibirsko (NEK)

12-4/ Decembro-2018-januaro-2019. Novojarsk-4 en Krasnojarsko (KRESKO)

13-**5**/ Majo-2019. OrSEJT en Tomsko, dediĉita al 40-jariĝo de TEK (TEK)

6. **Suda Regiono** — ne okazis

7. **Urala Regiono**:

14-1/ Oktobro 2017. Tradicia aŭtuna renkontiĝo de uralaj esperantistoj, dediĉita al someraj Esperanto–aranĝoj. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”)

15-2/ Novembro-2017. Aŭtuna Lingvotrejnado en Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”)

16-3/ Novembro-2017 - marto-2018. Tutregiona reta Esperanto-aktivaĵo “Fotoj el mia albumo”

17-4/ Decembro-2017. Tradicia festa kunveno de uralaj esperantistoj, dediĉita al la Zamenhof-Tago kaj la Tago de la Esperanta Libro. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”)

18-5/ Marto – aprilo de 2018. Tutregiona reta Esperanto-aktivaĵo “Transdonu bonhumoron”

19-6/ Junio-2018. Somera Esperanta kunveno de uralanoj kun kultura programo kaj komuna koncerto. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”)

20-7/ 25 oktobro –10 decembro-2018. Tutregiona reta Esperanto-aktivaĵo “***Libroj, kiujn ni legas***”

21-8/ Decembro-2018. Tradicia festa kunveno de uralaj esperantistoj, dediĉita al la Zamenhof-Tago kaj la Tago de la Esperanta libro. Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”)

22-9/ Majo-2019. Printempa Lingvotrejnado en Jekaterinburgo (EK “Arĝenta flamo”)

8. **Volgia Regiono**:

23-1/ Oktobro-2017. 22-a Lingva Festivalo en Ĉeboksari (Lingva lernejo “Язык для успеха”)

24-**2**/ Oktobro-2018. 23-a Lingva Festivalo en Ĉeboksari (Lingva lernejo “Язык для успеха”)

Raportoj de regionaj kunordigantoj de REU pri la agadperiodo julio-2017 — julio-2019

Post la REU-Konferenco aŭguste 2017 estis decidite ĝustigi regionojn de REU-agado en Rusio konforme al la aktualaj federaciaj distriktoj de RF. Al oktobro estis nomumitaj ok regionaj respondeculoj de REU (laŭ la alfabeta ordo de la regionoj):

1/ Centra Regiono (Centro) — Aleksandr Lebedev

2/ For-Orienta Regiono (For-Oriento) — Jevgenij Bojĉin

3/ Nord-Kaŭkazia Regiono (Nord-Kaŭkazio) — Abduraĥman Junusov

4/ Nord-Okcidenta Regiono (Nord-Okcidento) — Andrej Rjazancev

5/ Sibiria Regiono (Siberio) — Vladimir Sapoĵnikov

6/ Suda Regiono (Sudo) — Irina Gorodeckaja

7/ Urala Regiono (Uralo) — Pavel Veselov

8/ Volgia Regiono (Volgio) — Ildar Kijamov

Ni prezentu agadon de ĉiu distrikto surbaze de reagoj de la regionaj REU-kunordigantoj al la peto pri la antaŭkonferenca raportado.

1/ **Centro**

Aleksandr Lebedev rekomendas mencii, ke li ne plenumis la taskon.

2/ **For-Oriento**

Jevgenij Bojĉin raportas:

- En oktobro 2017 mi dufoje rakontis pri Esperanto en Riazana akademio FSIN de Russio (Рязанская академия ФСИН России): por studentoj (27 homoj), por bibliotekistoj (9 homoj).
- En novembro 2017 mi deklamis versojn de de Eŭgeno Miĥalski kaj Nikolaj Nekrasov dum vespero dediĉita al pereitaj poetoj (ĉeestis 20 homoj).
- En decembro 2017 mi rakontis pri Esperanto en la centra urba biblioteko (por 4 homoj)
- Komence de septembro 2018 mi faris nelongan prelegon pri Esperanto dum kunveno de la loka organizo de la Rusia unio de junularo (ruse: РСМ, Российский союз молодёжи), kie ĉeestis pli ol tridek gejunuloj.
- La 30-an de septembro 2018 en la urba biblioteko de Birobiĝano okazis la unua en ĉi tiu jaro kunveno de la literatura klubo «Grani», kadre de kiu mi rakontis pri Esperanto kaj pri verkistoj en Esperanto (ĉeestis 24 homoj.
- La 26-an de oktobro 2018 en la Urba centro de porinfana kaj porjunula libro (ruse: ЦДЮК — центр детской и юношеской книги) oni festis la 100-an datrevenon de komsomolo. Estis kelkaj ekspozicioj, dediĉitaj al diversaj flankoj de aktivismo. La feston vizitis multaj homoj. Esperanta ekspozicio situis en la ĉambro, kie okazis komsomolaj kunvenoj. Mi rakontis pri sia komsomola vojo kaj pri rilatoj inter komsomolo kaj Esperanto. Post komsomolaj kunvenoj mi respondis al demandoj de la gejunuloj pri Esperanto, demandis 12 homoj.
- La 27-an de februaro 2019 en biblioteko de sanatorio “Primorie” apud Vladivostoko mi rakontis al pluraj ripozantoj el diversaj urboj de Rusio pri Esperanto. Ĉiuj kore dankis pro la interesa prelego kaj du lecionoj, kiujn ĉeestis 5 homoj.

- La 29-an de februaro 2019 estis renkonto kun la estro de Vladivostoka Esperanto-klubo “Pacifiko” Gennadij Ŝlepĉenko, ni konversaciis pri la perspektivoj por la evoluo de Esperanto-movado en la Fora Oriento. En 2019 jaro en la vladivostoka E-klubo "Pacifiko" estis 6 klubanoj. Pri ilia laboro mi informon ne ricevis. Mi helpis Gennadij kontakti kun Vladimir Sapoĵnikov el u. Kemerovo, ili interparolis Esperante, sed la rezultoj ne estas sciataj.

3/ **Nord-Kaŭkazio**

Abduraĥman Junusov raportas pri sia propra agado:

Okazis E-kursoj kaj nun okazas. Du novbakitaj esperantistinoj partoprenos Italan E-kongreson (verŝajne, kun Abduraĥman). Aperis artikoloj kaj TV-elsendoj pri E-o. Abduraĥman maksimume uzis celebradon de sia 70-jariĝa jubileo por popularigi Esperanton. Ekz., dum la TV-elsendo, dediĉita al li persone, parto estis pri Esperanto (*ННТ. Кунацкая. Абдурахман Юнусов*). Kaj en la omaĝa aranĝo en la respublika biblioteko ankaŭ parto estis dediĉita al lia E-agado.

El tiu raporto videblas, ke en la regiono dum minimume 20 jaroj nenio ŝanĝiĝis: estas regiono de unusola esperantisto, sed fidela kaj ĉiam aktiva. Dank’al Abduraĥman en la respubliko oni scias pri Esperanto kaj pozitive rilatas al la Movado.

4/ ***Nord-Okcidento***

Andrej Rjazancev raportas pri agado de Esperanto-kluboj, entreprenoj kaj individuaj Esperantistoj (laŭ la alfabeta ordo de la regionoj).

Arĥangelsk, ***Larisa Ŝaposĥnikova*** active partoprenas rusiajn Esperantajn aranĝojn.

En jaroj 2017-2019 ŝi ĉeestis APEROjn en Apudmoskvo, kie kun M. Povorin organizis la Interpretistajn konkursojn. Dum RET-2017 en Poŝeĥonjo kaj RET- 2018 en Ŝuja ŝi ankaŭ estis organizanto de interpretistaj konkursoj. En januaro 2018 ŝi partoprenis Novojarskon-3 kaj en majo 2019 - OSERon-50 (ambaŭ en Tomsk).

Kaliningrad, ***Aleksandro Korĵenkov*** kaj ***Halina Gorecka*** daŭre okupiĝas pri eldona agado.

1) En la 2018a jaro ili eldonis 320-paĝan libron: “Nia diligenta kolegaro: Biografioj de 200 eminentaj esperantistoj”, kiu aĉeteblas en eldonejo “Sezonoj” kaj pere de la libroservo de UEA.

2) Dum la lastaj 2 jaroj estas eldonitaj 25 kajeroj de Ilia sendependa revuo “La Ondo de Esperanto” plus la literatura suplemento en elektronikaj PDF- kaj EPUB-formatoj, elŝuteblaj por la mendantoj el la retejo esperanto-ondo.ru.

3) Iliaj podkastoj (sonaj revuoj) “La Radio Esperanto”, publikigataj en retejo radio.esperanto-ondo.ru, dum la lastaj 2 jaroj aperigis 5 programojn, la lasta № 49 2019-maj-05.

4) Estas finita laboro pri la nova eldono de “Baza literatura krestomatio”, kiu nun jam estas aĉetebla dum someraj aranĝoj.

Murmansk, E-Klubo "***Murmano***"

1) 2017, la 23an de decembro. La kluba ĝenerala kunveno kaj la Z-Tago kun mizika programo.

2) 2018, la 17an de marto. Prezentado kaj prelego pri E-o en la Murmanska scienca biblioteko honore de la 30-jaraĝo de la murmanska E-Klubo.

3) 2018, julio-aŭgusto. Partopreno de nia samklubano en UK-103 en Lisbono.

4) 2018, la 15an de decembro. La Z-Tago kun la muzika programo, raportoj de la klubanoj.

5) 2018, la 22an de decembro. Foto-raporto de samklubano pri vojaĝo en UK-103 (Lisbono)

6) 2018. Eldono de libreto kun versoj de la klubano Aleksej Makarov “La Vojo en la Templon de Amo kaj Perfekteco” (Путь в храм любви и совершенства, Мурманск, 2018, 40 стр.). El 29 versoj 4 estas kreitaj en E-o. Tio ĉi estas fakte tekstoj por kantoj, ofte gitarludantaj far aŭtoro dum klubaj kunvenoj aŭ dum festoj.
7) 2019, la 23an de februaro. Festado de 31a jaraĝo de la klubo Murmano.
8) 2019, la 6-14an de julio. Partoprenado en la Baltiaj Esperanto-Tagoj.
9) Dum la jaro konstante. Ĉiusemajna (ĉiusabate) instruado aŭ konsultado por du diversnivelaj grupoj (materialoj de la kurso de Kolker, lernolibro "Gerda Malaperis" kaj novaĵaj videoj/aŭdioj el diversaj retejoj (ekz., la Ĉina interreta informejo, la Ĉina radio) aŭ el Youtube (intervjuoj, kantoj).

Novgorod (Velikij)
24-25.11.2018 en Novgoroda ŝtata universitato kaj en Novgoroda regiona biblioteko sur la teritorio de Kremlo pasis la 6-a Lingva Festivalo en Velikij Novgorod, organizita kun amika subteno esperantistoj el MEA MASI. Esperanto estis prezentita kelkfoje – de Irina Gonĉarova kaj Petro Fedosov. Esperantistoj el Moskvo estis varme akceptitj de la loka MASIano Georgo Kevorkjanc.

Novgorod (Velikij). ***Georgij Kevorkjanc***
Post la somero de 2017a jaro Georgo verkis 45 artikolojn por Esperanto-Vikipedio (la listo estas ĉi tie: https://eo.wikipedia.org/wiki/Uzanto:Dario_Aralezo). Li seninterrompe laboras super artikoloj pri sia regiono kaj agado de MEA MASI, kies membro li estas. Georgij partoprenis: 2018-feb-20/22 - AMO-44, APERojn-12 (2018) kaj 13 (2019) Apudmoskve kaj en majo-2019 la 4-an Lingvotrejnadon en Jekaterinburgo. La 7-an de aprilo-2019 li sukcese pasis KER-ekzamenon en Moskvo ĉe la nivelo B2.

Sankt-Peterburg, E-Klubo "***Kariljono***"
1) 2017, novembro. S-Peterburgon vizitis vicprezidanto de la Nepala Esperanto-Asocio s-ro Himlal Paraĝuli.
2) 2017, la 13an de decembro. Festado de la Z-Tago en la Belga konsulejo de SPb.
3) 2017, la 24an de decembro. Prelego de Valeria Cvetkova pri la Leningrada sieĝo.
4) 2018, majo. Renkontiĝo kun gasto el Brazilo Klovis Portes.
5) 2018, la 19an de decembro. Zamengof-vespero en la Petro-Paula Fortikaĵo kun prezento de E-Muziko kaj filmoj pri E-vivo en Japanio (movadoj Oomoto/Aikido).
6) 2018, la 30an de decembro. Lasta renkontiĝo en la sezono kun riĉa programo.
7) 2019, la 27an de februaro. Kunsido de la klubo kun prof. Jozef Villem Haazen.
8) 2019, la 27an de marto. Renkontiĝo en la kafejo Aurovilj.
9) 2019, la 24an de aprilo. Renkontiĝo kun la temo pri surtablaj ludoj.
10) 2019, la 25a de majo. Renkontiĝo en Petro-Paula Fortikaĵo.
11) 2019, la 14-16an de junio. Vizito de Brazila gasto Klovis Portes, ekskursojn tra S.-Peterburgo.

Sankt-Peterburg, ***Vjaĉeslav Ivanov***
15.04.2018 en la Sankt-Peterburga nacia esplora universitato de informteknologioj, mekaniko kaj optiko (ITMO) pasis la 12-a Lingva Festivalo, kie Esperanton prezentis Vjaĉeslav Ivanov, la iniciinto de la festival en la urbo.
Vjaĉeslav havas ĉeestan kurseton kun du lernantoj kaj active instruas Esperanton per skajpo en la interreta lingva kursaro **“***Italkin***”.**

Sankt-Peterburg, ***Boris Kondratjev kaj la teamo de la Vortaro***
1) Estis finita laboro pri la litero *O* kaj farita ĉirkaŭ 30% de la litero *П* en la Rus/Esp vortaro.
2) Estis aldonitaj ĉ. 2000 rus-esperantaj kaj 2000 esperanto-rusaj artikoloj.
3) Estis farita mekanismo de kolektado de la statistiko de la mendoj.

4) Estis farita mekanismo, permesanta aldonadi artikolojn ne sinsekve.
5) En rus-esperantan vortanon estis aldonitaj interkruciĝantaj ligiloj inter artikoloj
6) Estis verkita kaj prilaborita suplemento por saĝtelefonoj.
7) Al la interfaco *rueo.ru* estis aldonita vico de ŝanĝoj por pli oportuna uzado de la vortaro per saĝtelefono.
8) Estis farita perto de laboro(30%) por kontroli formeton de la fontaj dosieroj.
En majo 2019 Esp/Rus-vortaro superis pli ol 80 mil artikolojn.

Sankt-Peterburg, ***Kirill Noviĉenko***
1) Julio 2017. Partopreno en la Seula kongreso. Anstataŭado de Ĝenerala Sekretario de TEJO.
2) Oktobro 2017. Partopreno en la Tutmonda Festivalo de Junularo kaj Studentaro en Soĉi reprezentante TEJO-n kaj Esperanton entute.
3) Februaro 2018. Partopreno en AMO-44 kaj APERo-12 en Jerŝovo.
4) Majo-junio 2018. Partopreno en la Junulara Evento en Strasburgo ĉe la Eŭropa parlamento kiel aktivulo de TEJO.
5) Aŭgusto 2018. Partopreno en IJK en Badaĥozo (Hispanio).
6) Ĝis la fino de 2018-a jaro laboro pri elsendoj de la podkasto "Interalie".
7) Post la IJK dum duonjaro kune kun aliaj aktivuloj faris unu plian provon krei bazon por renaskiĝo de REJM. Malsukcesis.
8) Ekde komenco de la jaro 2019 - Komitatano C de TEJO.
9) En la jaro 2019 ekkontribuo de voĉlegado de artikoloj de la revuo Esperanto por ĝia sonversio.
10) Somero 2019. Partopreno en pretigo de TEJO-reprezentado dum la UK en Laĥti. Ankaŭ interkonsiloj pri varbado de TEJO-patronoj dum la UK.
11) Tutperiode: kunordigo de tradukteamo en VK.

Sankt-Peterburg, ***Anatolij Sidorov***
Anatolij daŭrigas esplorajn laborojn pri Esperanto-historio. En la “Biografiaro Ilustrita de Esperantistaro Ruslanda (kaj ne nur)” (BIERo) jam estas kompilitaj pli ol 1300 biografioj sur ĉirkaŭ 300 paĝoj kun fotoj. Anatolij esperas eldoni ĝin papere, malgrandkvante, aŭ minimume en Interreto. Li kompilis ankaŭ detalan kaj riĉan "Gazetaron de ruslandaj esperantistoj 1905-2019”. Estas jam preta abunda kompilaĵo pri gazetoj kaj revuoj, menciintajn pri Esperanto ekde 1887 ĝis 1917. La enhavo estas pli ol 24 paĝoj.

Sankt-Peterburg, ***Tatjana Stepanova***
sukcese studas ĉe Interlingvistikaj studoj en la universitato “Adam Mickeviĉ”, po dufoje jare vizitante la studsesiojn en Poznano (Pollando). Estante membro de MEA MASI, ŝi kelkfoje dum la du jaroj verkis artikolojn por MASI-eldonaĵoj. Ŝi partoprenis la apudmoskvajn MASI-renkontiĝojn APERo-12 kaj APERo-13, ĉiam aktive kontribuante la programon. Kune kun Ilja Gnusarjov ŝi faris multajn programerojn pri Esperanto-kulturo kaj Movado enkadre de APERo-13.

Tiĥvin, ***Tiĥvina E-klubo***
1) 2017-dec-22. Festa kaj muzika kunveno okaze de la Z-Tago.
2) 2017-januaro. Partoprenado en kristnaskfesta kurado en la urbo.
3) 2018-jan-18. Kunveno, dediĉita al renkonto de la novjaroj laŭ la diversaj kalendaraj stiloj.
4) 2018-apr-19. Klubkunveno pri organizado de la Tiĥvinaj E-Metiejoj (2019-jul-15-22)
5) 2018-jun-12. Somera renkontiĝo.
6) 2018-jul-04. Festado de jubileo de samklubano (Aleksandro).
7) 2018-sep-24. Malfermo de la sezono de la klubo.
8) 2019-jul-15-22. Organizado de la Tiĥvinaj E-Metiejoj.

Tiĥvin, ***Mikaelo Bronŝtejn***

…….

5/ **Siberio**

Vladimir Sapoĵnikov mem raportos pri sia region (vd aparte).

6/ **Sudo**

Irina Gorodeckaja petas ŝanĝi ŝin kontraŭ iu pli juna, pli aktiva kaj pli kapabla.

7/ **Uralo**

Pavel Veselov prezentas ĉi tie skrivan raporton (vd sube).

8/ **Volgio**

Tute neniu respondo de ***Ildar Kijamov***.

SUPLEMENTO

Raporto pri la esperantista agado en la Urala regiono por la periodo: septembro 2017 – junio 2019

1) 10 oktobro 2017, **Jekaterinburgo**. ***Tradicia aŭtuna renkontiĝo de uralaj esperantistoj, dediĉita al someraj Esperanto – aranĝoj***. Ĉeestis 18 homoj kaj unu Esperanto-gasto el Jalto Jefim Zajdman. ***Sergej Kumkov*** rakontis pri sia partopreno en SES (Slovakio), ***Raja Kudrjavceva***, ***Lena Uspenskaja*** kaj ***Pavel Veselov*** rakontis kaj montris fotojn pri la partopreno en RET – 2017 en Poŝeĥonjo, ***Jefim Zajdman*** rakontis pri sia somera turismado en Altajo kaj pri la agado de esperantistoj en Jalto.

2) 16 oktobro 2017, **Surguto**. Eldono de la legolibro "***Postkursa legaĵo***" de ***Vladimir Opletajev*** en Surguto. Tio estas kolekto de tekstoj kaj diversnivelaj ekzercoj kaj taskoj en la intenacia lingvo Esperanto, destinita al finintoj de baza kurso kaj al dezirantoj perfektigi lingvajn konojn (Niveloj A2 – B2).

3) 4–6 novembro 2017, **Jekaterinburgo**. ***Aŭtuna lingvotrejnado en Jekaterinburgo***, kiun partoprenis 38 homoj el 18 urboj de Rusio. En la programo estis lecionoj kaj aliaj programeroj: prezentado de la somera instruado en Barlaston (Anglio) fare de ***Lidija Jerofejeva***, kiu trifoje partoprenis tiun aranĝon, rakontoj pri la internaciaj projektoj: ***Sumoo***, ***Esperanta Poŝtkruciĝo*** kaj ***Amikumu***, informa programero pri REU, Ronda tablo pri regiona agado. Ne mankis ankaŭ distraj programeroj: Amika Vespero, komuna kantado, noktaj ludoj https://ural-sib.org/eo/pri-la-tria-lingvotrejnado-en-jekaterinburgo

4) 24–25 novembro 2017, **Jekaterinburgo**. Grupa vizito de jekaterinburgaj esperantistoj de la koncerton de pianisto-esperantisto ***Andrej Korobejnikov*** en la urba filharmonio.

5) **Tutregiona** reta Esperanto-aktivaĵo "***Fotoj el mia albumo***", kiu komenciĝis fine de novembro de 2017 kaj daŭris ĝis la marto de 2018.

6) 17 decembro 2017, **Jekaterinburgo**. Tradicia festa kunveno de uralaj esperantistoj, dediĉita al la ***Zamenhof–Tago*** kaj la ***Tago de la Esperanta Libro***, kiun partoprenis 29 esperantistoj el la tuta regiono. En la programo: raporto de ***Aleksandr Osincev*** pri la festado de la Zamenhof-tago tra la mondo; rakonto pri la partopreno de uralaj esperantistoj en la internacia projekto de legado "***Esperanto-sumoo***" kaj pri la libroj, kiujn oni legis; festado de la 10-jariĝo de la

jekaterinburga Esperanto-klubo “***Arĝenta Flamo***”, gratulado de ***Raja Kudrjavceva*** okaze de ŝia elekto kiel Esperantisto de la jaro 2017 en REU; komuna koncerto.

7) Novembro 2017 – januaro 2018, **Surguto**. Baza A-1-nivela kurso de Esperanto, 4 kursfinintoj, kursgvidanto: ***Vladimir Opletajev***.

8) Februaro de 2018. Partopreno de la urala esperantistino ***Raja Kudrjavceva*** en la seminario “AMO-44” kaj Esperanto – renkontiĝo “APERo–12” kaj raporto pri tio en la urala retpaĝaro.

9) 11 marto 2018, **Surguto**. En la urba “Festivalo de vojaĝantoj” estis prezentita informa programo de ***Vladimir Opletajev*** “***Vojaĝoj per Esperanto***”.

10) Marto – aprilo de 2018. Urala reta aktivaĵo “***Transdonu bonhumoron***”, kiu daŭris ĉirkaŭ unu monaton kaj dum kiu estis afiŝitaj en la dissendolisto kelkaj dekoj de humuraĵoj de diversaj ĝenroj.

11) 21 aprilo 2018, **Surguto**. Kadre de la tutrusia kulturaktivaĵo ***Biblioteka nokto Vladimir Opletajev*** en la Centra urba biblioteko A.S. Puŝkin al pli ol 30 gastoj prezentis la klerigan programon “***Ho, mia*** kor’” – historio de unu poemo en Esperanto, verkita de Ludoviko Zamenhof”.

12) Junio de 2018, **Jekaterinburgo**. ***Somera Esperanta kunveno*** de uralanoj en Jekaterinburgo kun kultura programo kaj komuna koncerto.

13) Julio – aŭgusto de 2018. Partopreno de uralaj esperantistoj en someraj Esperanto – aranĝoj: en UK-103 en Lisbono, RET- 2018 en Ŝujo, RA – 13 apud Novosibirsko.

14) Aŭgusto de 2018, **Jekaterinburgo**. Renkontiĝo de jekaterinburgaj esperantistoj kun la pola esperantistino Marija Dube, ekskurso tra la urbo, al la limo inter Eŭropo kaj Azio, eksterurba ekskurso al ***Ganina Jama***, kuna vespermanĝo de jekaterinburgaj esperantistoj kaj gastino en la kafejo “***Propra kompanio***”.

15) La 10-15 de septembro jekaterinburgaj esperantistoj kunlaboris kun oficiuloj de la muzeo de historio de **Jekaterinburgo**, preparante la ekspozicion, ligitan kun internaciaj lingvoj en la urbo kaj aranĝis tie montrofenestron pri Esperanto kaj ankaŭ pri la lingvo Omo, iam kreita surbaze de Esperanto (la aŭtoro estis loĝanto de Jekaterinburgo ***V. I. Vengerov***) Cetere dum la kontaktoj kun la familianoj de Vengerov, lia nepino ekinteresiĝis pri Esperanto kaj esprimis la deziron lerni ĝin.

16) 21–23 septembro 2018, **Jekaterinburgo**. Aŭtna renkontiĝo de jekterinburganoj kun la franca esperantistino ***Fransoazo Oazo***, ŝia leciono por la franclingvanoj en la fremda fako de la urba biblioteko, kuna vizito al la muzeo de historio de Jekaterinburgo kaj tiea malfermo de la montrofenestro pri Esperanto; Esperanto–klubkunveno en la Domo de uralaj popoloj, koncerto de Fransoazo kaj ŝia rakonto pri la vivo de francaj esperantistoj.

17) 17 novembro 2018, **Jekaterinburgo**. Partopreno de jekaterinburgaj esperantistoj en la vespera programo, dediĉita al la naskiĝtago de la urbo, en la historia muzeo de la urbo, prezentado de Esperanto al la ekstera publiko.

18) 25 oktobro –10 decembro 2018. **Urala reta** aktivaĵo “***Libroj, kiujn ni legas***”, kun 17 afiŝitaj en la dissendolisto recenzoj de 13 partoprenintoj el 7 urboj de Rusio.

19) 10–15 decembro 2018, **Niĵnij Tagilo**. Libroekspozicio de Esperantaj libroj en la centra urba biblioteko de Niĵnij Tagilo; festa renkontiĝo de tagilaj esperantistoj en la palaco “Jubilejnij”, partopreno de tagilanoj en la tutrusia projekto “***Decembra poezia marŝo de esperantistoj***” – voĉlegado de la poemo “Vintra fabelo” de *N. Ĥoĥlov* fare de ***Lidija Jerofeejva***.

20) 8–22 de decembro 2018. Jekateinburga esperantistino ***Raja Kudrjavceva*** iniciatis kaj kunorganizis la tutrusian Esperanto–projekton “***Decembra poezia marŝo de esperantistoj***”.

21) 15 decembro 2018, **Tobolsko**. Informado pri Esperanto, okazigita de ***Dilara Gadirova*** en Tobolsko en la infana centro de edukado kaj en la regionografia muzeo kaj voĉlegado antaŭ la ekstera publiko de la Esperanta poemo de “Nia lingvo” kadre de la aktivaĵo “Decembra poezia marŝo de esperantistoj”.

22) 15 decembro 2018, **Miasso**. Partopreno de la esperantista familio Vŝivcev el Miasso de Ĉelabinska provinco en la tutrusia projekto “Decembra poezia marŝo de esperantistoj”.

23) 22 decembro 2018, **Jekaterinburgo**. Tradicia decembra festa kunveno de uralaj esperantistoj, dediĉita al la *Zamenhof–Tago* kaj la ***Tago de la Esperanta libro***. En la programo: rezultoj de la projekto “***Libroj, kiujn ni legas***”, enmanigo de diplomoj al la partoprenantoj de la projekto kaj libro-premioj; partopreno en la tutrusia aktivaĵo “Decembra poezia marŝo de esperantistoj” – voĉlegado de poemoj en Esperanto kaj filmado; libroekspozicio de Esperantaj libroj, komuna koncerto kaj teŭmado.

24) ***Retpaĝaro “Ural-Siberia esperantista movado”*** https://ural-sib.org/eo . Konstante funkcianta paĝaro, prizorgata de ***Pavel Veselov*** (**Tjumeno**) kaj ***Raja Kudrjavceva*** (**Jekaterinburgo**). En agusto 2017– decembro 2018 estis afiŝitaj 32 diversĝenraj materialoj de 7 aŭtoroj.

25) ***Ural-siberia esperantista dissendolisto***, konstante funkcianta informa retservo, prizorgata de ***Pavel Veselov*** (**Tjumeno**).

26) “***Internacia Esperanto-sumoo***” – konkurso de librolegantoj en Esperanto, regule kaj amase partoprenata de uralaj esperantistoj el **Jekaterinburgo**, **Niĵnij-Tagilo**, **Surguto**, **Tobolsko**.

27) Partopreno de urala esperantistino ***Galina Terentjeva*** (**Ĉelabinsko**) en la regiona siberia esperantista renkontiĝo “***Novojarsk–2019***” , 31.12.2018 -05.01.2019, en Krasnojarsko. ***Raja Kudrjavceva*** salutmesaĝis al la renkontiĝo: https://vk.com/kresko1975?w=wall-106527521_1422%2Fall

28) 07.01 2019, **Jekaterinburgo**. Kristnaska renkontiĝo de jekaterinburgaj esperantistoj gaste ĉe ***Raja Kudrjavceva***. La festan renkontiĝon partoprenis ***Irina Gonĉarova*** – gasto el Odincovo (Moskva provinco)

29) 13.01.2019 – 27.01.2019. ***Internacia Esperanto-sumoo-56***, kiun partoprenis 9 uralaj esperantistoj. Al la urala grupo de legantoj aliĝis ***Sergej Ĵilejkin*** (Krasnojarsko) kaj ***Vladimir Viĉegĵanin*** (u. Naro–Fominsko). ***Raja Kudrjavceva*** kiel prizorganto de internacia grupo de legantoj kunlaboris kun s-ro ***Jasuo HORI.***

30) 16.01.2019, **Surguto**. ***Vladimir Opletajev*** lanĉis en la retgrupo “Esperanto en Surguto” https://vk.com/club59616356 la kulturklerigan projekton”***Bildoj de rusaj pentristoj***” En januaro estis aperigitaj 3 afiŝoj pri 3 pentraĵoj.

31) 01-31.0.2019, **Suguto**. ***Vladimir Opletajev*** daŭrigis en la retgrupo "***Esperanto en Surguto***" la klerigan projekton "***Ni lernas Esperanton. Esperanto en bildoj***". En januaro estis afiŝitaj tri bildoj kun klarigaj tekstoj.

32) La 17-n de januaro 2019 la sudurala reta informagentejo ***Lentachel. Ru*** publikigis ruslingvan artikolon de **ĉelabinska** esperantisto ***Vjaĉeslav Roĵdestvenskij***, dediĉitan al la 110–a naskiĝdatreveno de ĉelabinska sciencisto, pedagogo, kleriganto, esperantisto ***Boris Fjodoroviĉ Sokolov***. La artikolon de Vjaĉeslav Roĵdestvenskij eblas legi ĉe: https://lentachel.ru/news/2019/01/17/110-let-ispolnitsya-chelyabinskomu-uchenomu-borisu-sokolovu.html

33) 09.02.2019. Jekaterinburgaj esperantistoj kunvizitis en la urba filharmonio la konzertan proramon de Rem Urasin, pianisto el Kazano, kiu prezentis muzikaj verkojn de la germana komponisto Robert Schuman https://vk.com/ekaterinburgo

34) 16.02. 2019. En la kultur-palaco "Jubilejnij" kunvenis **tagilaj** esperantistoj kaj akceptis decidon pri la revivigo de la urba esperantista klubo "***Renaskiĝo***". La kunvenintoj elektis novan prezidanton de la klubo – ***Valerij Borodin***. La klubkunvenon ĉeestis ankaŭ ekstagilano ***Vladimir Viĉegĵanin***, nun loĝanta en u. Naro–Fominsko (Moskva provinco).

35) La 17-n de februaro de la 2019 en **Jekaterinburgo** okazis renkontiĝo de lokaj esperantistoj, kiun ĉeestis ankaŭ unu gasto el Apudmoskvo – ***Vladimir Viĉegĵanin***, la programo de la kunveno inkluzivis deklamadon de la poemoj okaze de la Amo-Tago, lingvajn ludojn, amikan teumadon, gitarludadon kaj kantadon, pridiskuton de aktualaj movadaj problemoj. https://vk.com/ekaterinburgo

36) La 21-n de februaro jekaterinburgaj esperantistoj – ŝatantoj de la klasika muziko povis ĝui la koncerton de konata pianisto kaj esperantisto ***Andrej Korobejnikov***, kiu volonte ĉiujare vizitas Jekaterinburgon, kaj kiu prezentis tiuvespere kvar sonatojn de kvar famaj komponistoj. Post la koncerto jekaterinburgaj esperantistoj renkontiĝis kun ***Andrej Korobejnikov*** https://vk.com/ekaterinburgo

37) 01–28.02.2019. Daŭris la kultur–kleriga projekto de ***Vladimir Opletajev*** "***Bildoj de rusaj pentristoj***". En februaro estis aperigitaj du afiŝoj pri du bildoj https://vk.com/club59616356

38) 01–28.02.2019. Daŭris la kleriga projekto de ***Vladimir Opletajev*** "***Ni lernas Esperanton. Esperanto en bildoj***", estis afiŝitaj tri bildoj kun klarigaj tekstoj

39) 25.03.2019. Komenciĝis ***aliĝkampanjo por la Printempa lingvotrejnado en Jekaterinburgo***. https://ural-sib.org/eo/printempa-lingvotrejnado-en-jekaterinburgo . La organiza grupo de la 4-a lingvotrejnado konsistas el: 1) ***Raja Kudrjavceva*** (**Jekaterinburgo**) – ĉefa kunordiganto kaj gvidanto de la program, 2) ***Irina Gonĉarova*** (Odincovo) – estrarano de REU, prizorganto de la instrumetodika kaj kleriga programo por la nivelo C3), ***Olga Ŝilajeva*** (Glazovo) – prizorganto de instru – metodika kaj klerigaj programoj por la nivelo B, 4) ***Andrej Grigorjevskij*** (Ŝumerlja) – prizorganto de instru–metodika kaj klerigaj programoj por la nivelo A, 5) ***Pavel Veselov*** (**Tjumeno**) – komputila servo, interreto, pretigo de nomŝildoj, certigiloj.

40) 07–10. 03.2019. ***Raja Kudrjavceva*** (**Jekaterinburgo**) partoprenis tradician esperantistan renkontiĝon de MEA MASI "***APERo–13***" en Zvenigorodo (Moskva provinco) kaj kontribuis por ĝia programo. Impresojn de Raja pri la aranĝo eblas legi https://vk.com/ekaterinburgo

41) 13.03.2019. Komenciĝis koresponda baza kurso de Esperanto “***Facetoj***” ĉe la reta grupo “Esperanto en Surguto”. La kurson gvidas ***Vladimir Opletajev.***

42) 17-31.03.2019. “Internacia Esperanto–sumoo -57” http://www.esperanto-sumoo.pl/ , kiun partoprenis 9 uralaj esperantistoj. Al la urala grupo de legantoj aliĝis ***Tatjana Kaminina*** (Orenburgo)

43) 18.03.2019. En **Niĵnij Tagilo** okazis kunveno de la urba esperantista klubo “***Renaskiĝo***”. La klubanoj diskutis aktualajn projektojn kaj agadplanojn.

44) 21.03.2019. En la naskiĝtago de la tutmonde fama komponisto J. S. Bach **jekaterinburgaj** esperantistoj vizitis la urban filharmonion kaj aŭskultis orgenan koncerton de la komponisto.

45) 21.03. 2019. Estas eldonita la aŭtora kurso de Esperanto “***Facetoj***” de ***Vladimir Opletajev*** en **Surguto**. Tio estas 110-paĝa baza dulingva gramatika kurso de Esperanto, destinita por engrupa kaj memstara lernadoj. La lernolibron konsistigas la programo de la kurso, enkonduka ĉapitro, 12 lecionoj, bloko por la taksado de lingvokonoj kaj kapabloj kaj Esperanta–rusa gramatika terminaro.

46) 01-31.03.2019. Daŭrigo de kulturkleriga projekto de ***Vladimir Opletajev*** “***Bildoj de rusaj pentristoj***”, estis aperigitaj du novaj afiŝoj https://vk.com/club59616356

47) 0 –31.03.2019. Daŭrigo de la kleriga projekto de ***Vladimir Opletajev*** “*Ni lernas Esperanton. Esperanto en bildoj*” Estis afiŝitaj du bildoj kun klarigaj tekstoj.

48) 20.04.2019. Okazis la vica kunsido de la urba esperantista klubo “***Renaskiĝo***” en **Niĵnij Tagilo**. ***Valerij Malcev*** kaj ***Valerij Borodin*** preparis en Esperanto raportojn pri kelkaj interesaj unikaj vidindaĵoj de la urbo: Vijsko–Nikolska preĝejo, Aleksandro-Nevskij katedralo kaj Eni – Jerusalema katedralo.

49) 20. 04.2019. En la centra urba biblioteko de **Surguto** okazis tradicia soci–kultura amasa aktivaĵo ***Biblioteka nokto***, dediĉita ĉi jare al la vivo kaj verkaro de A. S. Puŝkin. Dum ĝi ***Vladimir Opletajev*** gvidis programon pri Esperanto. Lin helpis kaj asistis s-ro ***Amangeldi Maldibajev***, surguta medicinisto kaj esperantisto. La partoprenintoj de la vespera programo informiĝis pri Esperanto, spektis videojn, partoprenis provlecionon.

50) 01- 30.04.2019. Daŭrigo de la kulturkleriga projekto “***Bildoj de rusaj pentristoj***” kaj kleriga projekto “***Ni lernas Esperanto. Esperanto en bildoj***” de ***Vladimir Opletajev***. En aprilo estis afiŝitaj po du bildoj kun klarigaj tekstoj en ĉiu el projektoj.

51) La 1-4–an de majo 2019 en **Jekaterinburgo** en la ripozejo “Bodrostj” okazis la 4-a lingvotrejnado – intensa diversnivela instruado de Esperanto. La aranĝon entute partoprenis 43 personoj el 20 rusiaj urboj. La ĉeforganizanto kaj gvidanto de la programo estis ***Raja Kudrjavceva***. La instruistan programon konsistigis *A. Grigorjevskij* (Ŝumerlja), *Irina Gonĉarova* (Odincovo), *Ilija Gnusarjov* (Penzo), *Olga Ŝilajeva* (Glazovo), ***Tatjana Vŝivceva*** (**Miaso**), *Aleksandr Mitin* (Niĵnij Novgorodo). Multajn raportojn kaj impresojn pri la sukcesa lingvotrejnado vi povas legi ĉe: https://ural-sib.org/eo

52) 18.05.2019. Maja kunveno de la esperantista klubo “*Renaskiĝo*” en la kulturpalaco “Jubilejnij” en **Nijxnij Tagilo**.

53) 12–26.05.2019. “***Internacia Esperanto–sumoo–58***” http://www.esperanto-sumoo.pl/ , kiun partoprenis 9 uralaj esperantistoj.

54) 30. 05.2019. ***Raja Kudrjavceva*** partoprenis la inaŭguradon de la “*Skvaro de uralaj popoloj*” en **Jekaterinburgo** kaj dum la “***Horo de monda poezio***” inter kelkdekaj diverslingvaj deklamantoj ŝi prezentis al la publiko ankaŭ la tekston de “*Revelacio*” en Esperanto: https://vk.com/ekaterinburgo

55) 31.05.2019. La koresponda Esperanto-kurso “Facetoj” daŭras. Unua kursfininto de la nuna sesio (marto–junio 2019) estas *Andrej Sorokin* (Tromso, Norvegio)

56) 01– 31.05.2019. Daŭrigo de la kulturkleriga projekto “***Bildoj de rusaj pentristoj***” kaj kleriga projekto “***Ni lernas Esperanton. Esperanto en bildoj***” de ***Vladimir Opletajev***, en kiuj estis afiŝitaj po 2 kaj 4 bildoj kun klarigaj tekstoj. https://vk.com/club59616356

57) 09-11.06.2019. **Jekaterinburgaj** esperantistoj okaze de la ***Tago de amikoj*** kunvizitis Jelcin–Centron kaj spektis du filmojn, prezentitajn kadre de la semajno de francaj filmoj.

58) 22 .06. 2019. Okazis vica kunveno de la tagila urba esperantista klubo “***Renaskiĝo***”.

59) 25.06.2019. Esperantistoj el Jekaterinburgo kunvizitis la koncerton de saksofonistoj “PO-KVARTETO” en la urba Domo de muziko, dum kiu estis prezentitaj muzikaj verkoj de komponistoj de Barokepoko ĝis la XX–XXI jarcentoj.

60) 25.06.2019. Formiĝis dua grupo de korespondkursanoj el diversaj urboj de rusio por la somera sesio de koresponda baza kurso de Esperanto, kiun gvidos ***Vladimir Opletajev*** el **Surguto**.

61) La 29-an de junio en **Jekaterinburgo** okazis tradicia unika en la mondo muzikfestivalo “***Nokto de muziko***”, dum kiu sonis la muziko de diversaj ĝenroj kaj stiloj en pli ol 80 diversaj placetoj de la urbo. Jekaterinburgaj esperantistoj vizitis plurajn muzikkoncertojn dum tiu ĉi populara amasa programo.

62) 01.06–30.06. Daŭrigo de la kulturkleriga projekto “***Bildoj de rusaj pentristoj***” kaj kleriga projekto “***Ni lernas Esperanton. Esperanto en bildoj***” de ***Vladimir Opletajev***. Junie estis afiŝitaj po 2kaj 3 bildoj kun klarigaj tekstoj ĉe: https://vk.com/club59616356

Regiona kunordiganto de REU en Uralo
Pavel Veselov (*Tjumeno*)